

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO
Unu Jaro Sm. 1.20 | Helpabono. . . . Sm. 4.—
Spesito (Sm.) = 100 Spesdektoj (Ed.) = 2.50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj =
1/2 dolaro = 1 rublo = 2.40 kronoj austr. = 1.20 kronoj Sved. (proksimume).
Oni abonas ĉe la Administrado
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

REKLAMO
1 paĝo Sm. 100 — 1/4 kolono Sm. 7.—
1 kolono 25 — 1/2 kolono 4.—
1/2 13. — 1/8 kolono 2.50
25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj
Ĝeneralaj Agentoj : G. WARRNER, 46, Rue Sainte-Anne, Paris-2-
C. A. L. BROWN, 53, Wych Street, London W. O.

Internacia Organizaĵo Esperantista

(1)

Per serio de artikoloj aperantaj ĉe tiu loko, ni intencas detale ekzameni ideon, kiu jam estis diversfoje aludita en nia gazeto, kaj nun estas sur la vojo al certa efektiveco, nome la kreo de Internacia Organizaĵo Esperantista. Sed antaŭ ol paroli pri la utileco kaj funkciado de tiu nova organismo, estas antaŭ ĉio necese, rememorigi pri la cirkonstancoj, kiuj kondukis al la realigo de la dirita ideo, kaj, farante ĉi tion, ni ne nur pliklarigos la intencojn de ĝiaj iniciatintoj, sed ankaŭ forpelos kelkajn malkomprenigojn aŭ negustajn interpretojn, kiujn naskas ĉia nova ideo.

En monato oktobro, ĝuste kiam la Esperantistoj, refortikigitaj per la sukceso de nia neforgebla III^a kongreso, rekomencis ĉi labori kun nova energio, kunvenis en Parizo kelkaj sciencistoj, el kiuj konsistis la komitato de la Delegitaro; ĉi tiu komitato, jam kritikita ĉi tie, elvokis al la atento de la Esperantistoj la gravan demandojn pri reformoj, kaj timigis, ke pro tio bedaŭrinde malpacoj kaj senfruktaj diskutoj okazos interne de nia anaro. Rondo de sciencistoj postulis la enkondukon en Esperanton de kelkaj teoriaj reformoj, kies neceso neniam estis sentita de la plimulto de la veraj interesatoj, nome la Esperantistoj mem. Dum kelka tempo, oni povis timi — ne sen gravaj ŝajnoj de vereco — ke reformoj aŭ teoriaj plibonigoj estos enkondukataj ne nur de neesperantista komitato, sed de iaj esperantistaj organoj, kiuj por tia grava tasko ricevis nenian komision de la Esperantistaro. Reformi Esperanton per dekreto neniu rajtas kaj neniu povas, unupartite ĉar ekzistas neniu komisiita aŭtoritato por tio, aliparte ĉar Esperanto estas la propraĵo de unu aŭ kelkaj personoj, sed de miloj da homoj. Tioj homoj, ĝin propagandante, prenis sur sin antaŭ la publiko gravan respondecon, certigante, ke la lingvo disvastigita de ili, estas lingvo tute preta, tuj uzebla kaj jam vivanta, prefikante pri tio jam de multaj jaroj kaj akirante la konfidon de la publiko nur per tiu aserto, kiu fariĝis tute malĝusta kaj nehonesta, se la lingvo estas fakte la propraĵo de kelkaj personoj, arogantaj al si la rajton fari per ĝi pli-malpli sukcesajn eksperimentojn. Kvankam interkonsento inter ĉiuj partianoj de lingvo internacia estas dezirinda, kiel ni tion esprimis, ĉi tiu interkonsento devas fariĝi sur jam ekzistanta realaĵo, sur la fundamento de la tradicio, kiu al ni donas grandan liberecon plibonigi la lingvon per vojo senrompa kaj libera, laŭ la mezuro de la praktiko. Ekster la tradicio, ĉio estas malecra, ĉar tio dependas de la gusto de tia aŭ alia individuo.

Por malhelpi, ke reformoj fariĝu sen la konsultoj al la solaj interesatoj, ni tiam dissendis al ĉiuj grupoj Esperantistaj cirkulerojn, kies celo estis ĵeti: montri, ke neniu nun havas la rajton enkonduki reformojn per dekreto, ke nur en la okazo, se la ĝenerala opinio de la Esperantistaro inklina al la principo de reformoj, estus necese konsulti la interesatojn per regule elektitaj delegitoj, por ke ne okazu tro grava rompo en nia unueco; fine, ke estas dezirinda la starigo de internacia organizaĵo, kiu puŝos Esperanton rekte en la vojon de la praktikaj aplikoj, kaj, starigante nian aŭtoran sur praktika materiala fundamento, fortikigante la ligilojn de solidareco inter samideanoj *unantaj* tiun lingvon, metante la unuecon de nia movado ne nur sur la fideleco de ĝiaj partianoj,

sed ankaŭ sur la utileco al ili de tiu ilo, kiun ili penas diskonigi, ŝirmos por ĉiam nian entreprenon kontraŭ ĉiuj danĝeroj kaj ĉiuj atencoj. Tion programon, en mallonga tempo, aprobis pli ol 140 grupoj Esperantistaj, kiuj ĝin subskribis al siaj anoj. Intertempe la situacio, kreita pro la decido de la Delegitaro ŝanĝigis: tre multaj grupoj tute klare esprimis sian opinion kontraŭ la proponitaj reformoj, la Lingva Komitato same agis, fine la rilatoj inter D-ro Zamenhof kaj la Delegitaro — aŭ pli ĝuste la kondukantoj de la Delegitaro — estis rompita pro la troaj pretendoj de tiu lasta, kies pure teoriaj laboroj, kiel ajn interesaj ili estas, absolute ne estas kompareblaj kun la rezultato de la agado de miloj da homoj laborintaj dum longa tempo sur la kampo praktika. La lasta cirkulera letero de D-ro Zamenhof al la Esperantistaro klare kaj trafte resumis la tutan aferon; post ĝi, ni opinias, ke la demando pri la reformoj nepre devas esti forigata.

La danĝero de teliĉa forpasis; kontraŭ la forta unueco de la Esperantistoj rompiĝis sensukcese ĉiuj personaj atakoj; sed, kiel post ĉiuj danĝeroj, oni nun sin okupas pri la manoj, kiujn al ni montris la batalo. Tra la Esperantistaro iras nun deziro al pli da efektiva unueco, pli da ordo en nia agado, pli da praktikeco en nia movado. La sperto montris al ni la vanecon kaj danĝeron de la teoriaj lingvaj diskutoj, kiuj rekondukas nin rekte al la nova Babela turo. Por ke tiu danĝero jam neniam reokazu, por ke nia afero staru tute certe, estas necese, ke ni konsideru nian lingvon kiel faktan ekster ĉi diskuto, kiel ĉi tiu sendube pli-malpli perfektan, sed tute sufiĉan, kiun homoj uzas por sin reciproke kompreni — ĉefa kondiĉo. La vivo mem reguligas ĝian iradon, apertigos la bonan de la malbona, ĝin alĝustigos al la bezonoj de ĝiaj uzantoj. Nia deo nun, nia deo la plej urĝa estas: enkonduki Esperanton en la ĉiutagan vivon, plimulti ĝiajn aplikojn, krei per ĝi internaciajn praktikajn servojn, ĝin vivigi per la uzo, se ni ne volas, ke ĝi mortu per la diskuto. Tion ĉion esprimas la dua parto de la supre aludita cirkulero. La lingva demando feliĉe malaperis el la kampo de niaj priokupoj. Restas nun la pozitiva parto, kiu postulas ĉies kunlaboron kaj aktivan agadon: kreo de internacia organizaĵo por praktikaj aplikoj per Esperanto. Por tio ni dissendis al ĉiuj grupoj Esperantistaj duan cirkuleron, kun la peto, ke ili bonvolu elekti delegitojn. Jam multaj favore respondis nian alvokon kaj ĉio antaŭmontras, ke nia afero staras sur la bona vojo, kaj ke la projektata organizaĵo tre baldaŭ komencos labori laŭ preciza plano.

En proksima artikolo, ni ekzamenos kiel internacia organizaĵo estas necesa kaj laŭ kiuj principoj ĝi direktos sian agadon.

(Daŭrigato).

H. HODLER.

TRA LA MONDO

AŭSTRIO

Prah, marto 1908.

Nacio ĉiela perdis homon de gravega signifio por sia kulturo kaj sekve por kulturo tutmonda, ĉar evolucio de nacioj kondiĉas progreson de homaro. Tial estas bezone ankaŭ en nia ĵurnalo diri kelkajn vortojn pri Svatopluk Cech, unu el la plej gloraj ĉeĥaj poetoj, kiu mortis la 23-I en Prah. Li estas la plej grava kaj plej eminenta bohema poeto. Siajn temojn li prenis el historio precipe bohema, sed verkis ankaŭ

trifondpensajn alegoriajn versaĵojn. Lia signifon por Ĉeĥoj oni povas kompari kun signifo de Schiller por Germanoj. Li estis fervora predikanto de libereco, justeco kaj frateco, kiujn li volis vidi ekregi ne nur inter individuoj, sed ankaŭ inter nacioj, kiel estas komprenebla ĉe filo de nacio, kiu batalas por sia rajto al vivo. Li estas idea patro de generacio, kiu nun estas kvardek aŭ kvindek-jara; liaj « Kantoj de ŝlavulo » eliris en 20 eldonoj dum 2 jaroj, kio al nenia ĉiela libro ankoraŭ okazis. Li estis ankaŭ fervora revanto pri unueco de ŝlavo.

Pri projekto de S-ro Aerenthal pri fervoro en Balkano mi ne raportos, ĉar pri ĝi jam bone parolis tiu ĉi ĵurnalo en « Kroniko politika ». Mi rimarkas nur ke la parolo de la ministro kaŭzis multajn artikolojn eĉ en bohemiaj ĵurnaloj, ĉar jam longe ne eliris el Aŭstria registaro la projekto de internacia graveco. El tiu intereso estas ankaŭ videbla, ke la ŝanĝo de balotsistemo tamen iom pligrandigis la seĝon pri komunaj interesoj aŭstrijaj. Sed estas rimarkinde, ke en Aŭstrio la gvidado de la eksterlandaj aferoj estas rezervita al la imperiestro, kaj la parlamento tute ne povas ion pri ili decidi. Nur delegacioj efektitaj de Viena kaj Budapeŝta parlamentoj povas akcepti aŭ malakcepti buĝeton por proponitaj agadoj. El tio eble rezultas la apatio, kun kiu la ŝtatanoj akceptas projektojn registarajn pri eksterlanda politiko.

En Hungario okazas skandala proceso kontraŭ Slovakoj, kiuj volis malpermesi, ke la preĝejo, kiun ili el propra mono konstruis, estu inaŭgurita de malamika hungara (magara) pastro. Pro tio la ĝendarmoj venantaj kaj la pastro mortigis per pafado 45 Slovakojn kaj multajn arestis. Kontraŭ arestitoj estis nun (de 3-III — 10-III) proceso en Ruzomber. Priskribi ĝin mi ne povas, ĉar Hungara registaro malpermesas poŝtan sendadon al ĵurnaloj, kiuj sole priskribas (ne kritikas) ĝian juŝlecon. La celo de la Hungara registaro estas klare videbla: malaperigi la dumilionan nacion de Slovakoj. Baldaŭ eliros en Prah esperante verkita broŝuro priskribanta la malbonan sorton de Slovakoj. Homoj de internacia civilizacio legu ĝin!

S. K.

FRANCUJO

Parizo, Marto 1908.

Antaŭ ne longe, S-ro Clemenceau festis la dujaran datrevenon de sia alveno ĉe la ministaro. En Francujo tio jam estas atentinda kaj malefika rezultato. Malmultaj estas la ministroj, kiuj sukcesis vivi dum du plennaj jaroj, kvankam en la lastaj jaroj oni povis konstati, ke ili estas iom pli vive-maj, ol antaŭe. Tamen, iuj versaĵoj opinias, ke la nuna tre sufiĉe vivis: ili ne ŝparas siajn penojn por ĝin fordanki je la eterna tempo. Le kontraŭministara batalado fariĝas efektive ĉiam pli akra, kvankam ankoraŭ kaŝema. Kontraŭ si la ministaro havas ne nur la dekstrumajn kaj socialistajn partiojn, sed ankaŭ parton de la maldekstrumaj radikal-socialistoj, kiuj penas subfosi la konfidon al ĝi per diversaj rimedoj. Ili atingis ĝin nun malsukcese, ĉar la apogon, kiun la ministaro perdis maldekstrume, li retrovis en la centron, ĉe la tiel nomataj progresistoj, kiuj antaŭe apartenis al la opozitara. La diskutado pri la laŭtenta imposto komenciĝis, sed ĝi estas tre longa, ĉar la kontraŭstaro, kiu tiuokaze enhavas la centron, forte batalas por modifi la projekton. La registaro ne facile cedas, sed estas de nun certe, ke, se la projekto legiĝas, ĝi estos

ricevinta multajn ŝanĝojn; tamen eĉ tiel ĝi estos progreso kaj grava simpligo.

La Parlamento voĉdonis leĝon, laŭ kiu trijara apartigo inter geedzoj estas plenaryte transformita en leĝan ekcedigon, laŭ la peto de edzo aŭ edzino. Tiu novaĵo estis sufiĉe forte kontraŭbatalita, aŭ en la gazetaro, aŭ en la Parlamento, ĉefe en la Senato. La esencaj argumentoj elmetitaj kontraŭ tiu propono reduktiĝas al du: la katolika dogmo pri la nerompebleco de la geedza ligilo, la profito de la infanoj. Rilate al la unua oni prave rimarkigis, ke post la apartigo de la elekzio el la ŝtato, ĝi ne plu havis leĝan valoron. La katolikaj oratoroj timigis, ke tiu leĝo estos paŝo al la libera geedzigo, sed oni respondis al ili, ke la novaĵo proponita eble malhelpos la apartigon inter geedzoj katolikaj, ĉar tiu apartigo estos plenaryte transformebla je ekcedzigo, kaj sekve konservos la edzecan ligilon. Rilate al la dua, oni devas konfesi ke simpla apartigo estas pli malbona ekzemplo por la infanoj, konstante pasantaj de familio al alia, ol leĝa ekcedzigo, kiu definitive reguligas ilian situacion. Pri la materiala flanko, la dispono de la unua juĝo pri apartigo restos la sama por la infanoj post la plenaryte ekcedzigo. La leĝo estas do samtempe morala kaj liberala.

Paroli pri Marokaj aferoj estus kvazaŭ anakronismo, same kiel paroli pri la pureco de Parizo: nia urbeo estas efektive nun vasta strataro, subfosta, distranĉita de kavajoj, malpurigita de ŝimo, rompita de bariloj kaj palisaroj; ĉio oni laboras aŭ kvazaŭlaboras por ĉion rebonigi, sed tiu rebonigo, ŝajnas, daŭras jam de tro longe. En la ĉefaj stratoj la movado de la veturiloj kaj ĉiuspecaj homtransportiloj fariĝis tia, ke la malferma piediranto ja ne devas esti interne priokupata, se li ne volas esti ŝurmarŝita iamaniere. La malordero, kaŭzata de la kreskanta cirkulado, estas ĉiam pli granda. Estas vero, ke de dudek jaroj la movado en kelkaj stratoj pli ol duobliĝis, sed tio ne estas sufiĉa absolvo. La starigo de severaj regularoj pri tiu punkto estas necesa; se ne, la danĝero estos tiel granda, ke la famo de Parizo iom suferos el tio.

La propono pri la transporto de la cindroj de la fama verkisto Zola al Panteono elvokis akademiecan diskutadon ĉe la Deputataro. La tempo forpasis, kiam eĉ vorteto pri aŭtoro Dreyfus estis kaŭzo de nedirebla tumulto; tute kviete oni alskribis la diversejn paroladojn por kaj kontraŭ, kaj oni konsideris la meriton de la aŭtoro ĉefe de vidpunkto nacia kaj ĝenerala. La verkisto Barrès, apartenanta al la partio nacionalista, energie protestis kontraŭ la propono, kaj penis montri, ke la sukceso de Zola estis ŝuldata nur al skandalo kaj pornografio, ke ĝia verkuro, tre disvastigita fremlande, liveras tute malĝustajn ideojn pri la Francaj moroj. Al li respondis pliaj talente la ĉefo de la socialista partio, Jaures, montrante, per grandioza parolado, la amon de Zola al la vivo, al la vero, al la scienco, glorigante lian kuraĝon dum afero Dreyfus, kaj vidigante en li la postulon de la gloraj aŭtoroj de la XVIII^a jarcento, kies verkoj alkondukis la liberigon por la Franca revolucio. La projekto estis akceptita per granda plimulto. Estas nediskutebla, ke kelkaj el la riproĉoj de S-ro Barrès estas pravigeblaj: la verkuro de Zola en la unua tempo ŝuldis la sukceson pri la skandalo ol al sia interna valoro: en Francujo oni legis ĝin aŭde, sed tute ne konsideris kiel precizan pentraĵon de la Francaj moroj; en fremlando oni ricevis malan impreson. Plie, Zola estas ne rekte respondebla pri la nuna pornografia literaturo, kiu sub ŝajno de priskribo de la vivo celas nur al ekscito de pasioj kaj plej nesocialaj instinktoj. Sed, flanke de tiuj malmajoj, oni devas rekoni la gran-

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO
Unu Jaro Sm. 1.20 | Helpabono. Sm. 4.—
Sesmonate (6m.) = 100 Spesdedoj (5d.) = 2.50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj =
1/2 dolaro = 1 rublo = 2.40 kronoj aŭto = 1.30 kronoj Skand (proklamumo).
Oni abonas ĉe la Administrado
S. Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la loka agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
S. Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

REKLAMO
1 paĝo Sm. 100.— | 1/2 kolono Sm. 7.—
1 kolono » 25.— | 1/4 » » 4.—
1/8 » » 13.— | 1/8 » » 2.50
25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj
Generalaj Agentoj : G. WARTER, 40, Rue Sainte-Anne, Paris-2.
G. A. L. BROWN, 53, Wych Street, London W. O.

Internacia Organizaĵo Esperantista

(II)

Ĝis nun nia movado konsistis ĉefe el propagando : oni diskonigis nian lingvon per diversspecaj rimedoj, paroladoj, gazet-artikoloj, kursoj publikaj, k. a. Por tio oni fondis en ĉiuj landoj grupojn, societojn, lokajn organizaĵojn, kies ekskluziva celo estas la propagando de nia lingvo per la supre nomitaj manieroj. Tiuj lokaj organizaĵoj plej ofte kunligiĝis nacie pro diversaj praktikaj kaŭzoj, por pli trafa agado, por plifortigo de la unueco inter samlingvaj Esperantistoj. Dank' al tiuj necesaj organizaĵoj, Esperanto nun akiris tre ŝatindan nombron da adeptoj kaj aprobandoj. Venis nun la dua parto de la laboro, nome, la utiligo kaj uzo de tiu ilo, kiun disvastigas la lokaj aŭ naciaj propagandaj societoj. Ni ĝis nun rilatis kun la publiko, montrante la fasonon de nia konstruaĵo, sed al la enirantoj kaj al la dezirantoj eniri, ni devas montri la internan komforton de tiu konstruaĵo, la utilon, kiun ili ricevos, ĝin enirinte ; se ne, la enirintoj, trovinte neion sufiĉe allogan por ilin teni, eliros kaj jam neniam revenos, kaj la dezirantoj eniri ne defankigos de sia vojo por ĝin viziti. Tiu fenomeno estas sufiĉe konata de la plej multaj grupoj pro ke mi pri ĝi ne insistu. En la komenco regas fervoro kaj granda entuziasmo, la Esperantista fluo trukuris tulan urbon ; post la paso de kelkaj monatoj, la plej multaj entuziasmitoj tute malvarmigis, ĉar post la unua fervoro, ili per Esperanto ricevis nenian sufiĉe gravan profiton kaj nenian novan utilon ; ĉiuj mortas multaj bonaj semoj. Se al tiuj homoj venintaj al ni, ni povus prezenti difinitajn servojn, kiujn al ili donos nia lingvo, ili restus en niaj vicoj, instigite ne nur per la amo al nia ideo, sed per la ĉiutaga bezono. De tio rezultas la neceseco uzi Esperanton kaj krei per ĝi praktikajn aplikojn, sed kiel por ĝia propagando, estis necese la kreo de specialaj organizaĵoj, kiuj metos ilin da ordo kaj metodo en tiu propagando, tiel same por ĝin utiligi estis necese la kreo de aliaj organizaĵoj, sen kiuj preciza agado estas neeble. Tial kreigis unupartie fakaj societoj, kiuj celas uzi Esperanton por sia propra speciala fako, alilparte Konsuloj, Esperanto-Oficejoj, k. a., kiuj celas liveri semperan utilecon al ĉiuj Esperantistoj. Sed ne sufiĉas, ke tiuj organizaĵoj ekzistas ; estas necese, ke ili vivu, interrilatu unuj kun la aliaj, ke la publiko sciu, kie ili estas, kion ili faras. Ĉar ĉiu movado postulas organizaĵon, nia movado internacia pro la publiko al kiu ĝi sin turnas, postulas organizaĵon tiel same internacian. La sperto montras, ke estas neeble starigi konsularon laŭ unuforma plano, sen ia komuna organizaĵo, kiu fiksis la taskon de tiuj organizaĵoj kaj difinos la servojn, kiujn de ili rajtas postuli la publiko. Esperanto-Konsuloj kaj Oficejoj, esperantistaj vojaĝoj kaj hoteloj, dungado per Esperanto, jen estas tiom da necesaj servoj, kiuj estas certe krebalej nur per internacia organizaĵo. Nuntempe, pri ĉiu el tiuj servoj laboras disaj kaj nekonekte unu de la alia aro da personoj, kiuj por tute sama celo forigas fortojn, dedecblajn al aliaj taskoj se ĉiu el tiuj laborantoj havus difinitan mision kaj rilatus kun la laborantoj en la sama fako. Nuntempe, la Esperantistoj, spite sia nombro, estas ankoraŭ malfortaj. En ĉiuj oficialaj klopodoj por la ricevo de tia aŭ alia favoro, ili posedas nenian rajtigitan reprezentanton. Multajn ekzemplojn de tio montras la sekvo de niaj artikoloj. Ni citu nur unu : ni supozu, ekzemple, ke oni deziras skribi Esperante

la avizojn en la vagonaroj. Por tio specialaj klopodoj estos necesaj ; se ekzistas nur privataj homoj aŭ simple delegitoj de laj malfortaj organizaĵoj, la aŭtoritateco de la Esperantistoj estos multe pli malgranda ol tiu, kiun havas reprezentanto de la organizita Esperantistaro, kiu povus paroli en ĝia nomo kaj certigi kion interŝange donos la Esperantista organizaĵo (ekzemple, la Esperantista Organizaĵo povas organizi opajn vojaĝojn, diskonigi en siaj Esperanto-Oficejoj la horlibrojn, gvidilojn, prospektojn de la fervoja kompanio, k. t. p.). Oni ne povas diri, ke por tio sufiĉas la naciaj societoj. Krom tio, ke tiuj societoj estas pure propagandaj, ekzistas tre grava malhelpo pro tio, ke la nomitaj societoj konigas nur en sia propra lando la rezultatojn de sia agado. Jen ekzemplo, kiun ni ne mem elpensas, sed ĉerpas el la realaĵo : tiu nacia societo laŭdire klopodis por enkonduki Esperanton ĉe la hotelistojn de sia lando ; bedaŭrinde, ĉar avizo pri tio aperis nur en la organo de la nacia societo, scias pri tiu iniciato nur la enlanduloj, tio estas ĝuste la personoj, por kiuj Esperantistaj hoteloj tute ne havas utilecon. Ni ripetu, ke nenia klopodo havas praktikan valoron, se ĝi ne estas internacie farata, kaj ĉiu pure nacia iniciato de perseranta servo, eĉ bonega, estas kondamnata al frua morto, se ĝi ne estas imitata en aliaj landoj samtempe. La naciaj societoj celas disvastigi Esperanton per la nacia lingvo, sed ne krei per ĝi praktikajn aplikojn, ĉar tiuj aplikoj estas ĉiam internaciaj kaj sekve devas esti kondukataj de internacia aŭtoritato, kiu povos doni garantiojn pri la internacieco kaj tuja uzebleco de la afero entreprenita.

Fine, estas necese, ke oni sciu tre precize, kiuj personoj en difinita fako kaj en difinitaj urboj, povas utili al la publiko. Al ĝi ni ĝis nun diris : lernu Esperanton, ĉar vi partoprenos en granda ideo, ĉar Esperanto estas lingvo mirinda, sed kiam al ĝi ni povas diri : lernu Esperanton, ĉar ĝi donos al vi tute certe tiujn difinitajn servojn, ĉar en tiuj urboj vi trovos difinitajn personojn, kun kiuj vi povos rilatiĝi por viaj aferoj, tiam ĝi venos al ni multe pli certe kaj konfide, ĉar ni prezentos nedubeblajn realaĵojn. Por krei ĉi tiujn servojn, ni posedis ĉiujn elementojn, sed ili estis disaj, sen precizaj rilatoj unu kun la alia ; nur internacia organizaĵo iom post iom forigos tiun mankon de unueco kaj kunagado. Kiam ni klarigos la funkciojn de la fondata asocio, ni montras kiamaniere tiuj elementoj estas de nun utiligeblaj. Ni nur konkludu per tio, ke nia organizaĵo celas la *organizon de internaciaj servoj per Esperanto*.

El tio supre dirita, sekvas, ke, ĉar ĝia celo estas alia, la nomita organizaĵo neniel anstataŭas aŭ forigos iun el la ekzistantaj organizaĵoj. Ni ne volas malkonstrui por rekonstrui iun novan, laŭ la metodo ŝatata de la pilbonigistoj, sed nur, flanke de la ekzistantaj, konstrui novan organon, kiu ĝis nun mankis kaj farigas nun tute necese por la evolucio de nia movado sur la kampo praktika. Tio klarigas kial, por la realigo de sia programo, la iniciatoj de la aludita organizaĵo ne turnis sin al la naciaj societoj, kiuj havas malsaman celon. La organizaĵo, por kiu ni laboras, neniel celas unigi la naciajn societojn, kiel ĉiuj erare kredis, nek sin trudi kiel legodona aŭtoritato por la tuta Esperantistaro. En ĝi anigos nur tiuj samideanoj, kiuj aprobas nian programon kaj volas kune laboradi por ĝia efektigo. Konsekvence, la demando, ĉu la Esperantistoj devos submetiĝi al ĝi aŭ ne, signifas absolute nenion, ĉar la personoj, kiuj staras ekster la societo nek submetiĝas nek malsubmetiĝas al ĝiaj

decidoj, kiuj ilin ne koncernas. Ni simple nin turnis al la grupoj Esperantistaj, kiuj reprezentas la unuan gradon de nia nuna organo, por ke ili konigu nian alvokon al la Esperantistoj de sia loko, kiuj deziras uzi Esperanton, kaj por ke, elektante delegitojn por la organizaĵo, ili povu partopreni en ĝia kreado, kaj, de la komenco, konvinkigi pri la taŭgeco de la servoj starigitaj de ĝi.

Per la proksima artikolo, ni ekzamenos la funkciojn de la nova Esperantista organizaĵo.

(Daŭrigota).

H. HODLER.

TRA LA MONDO

DANUJO

Kopenhago, Aprilo 1908.

La dana financa krizo nun daŭras duonnan jaron, sed la pleja malboneco estas tamen apenaŭ subigata. Antaŭ ol paŝi ĉe la nuntempo aŭ komentario pri la estonto, ni kun malmultaj vortoj volas rememorigi pri la kaŭzoj de la nuna misero. La konjektoj de la internacia komercero, kiuj dum 1907 kun la plialtigantaj prezoj de la komercaĵoj grade vastiĝis kaj amasiĝis kun la amerikana krizo lastan aŭtunon, sendube ne estis sen influo sur la skandinaviaj financoj, kaj ĝi frapis tie ĉi tre severe, ĉar la situacio jam estis serioza. En Kopenhago la kaŭzo de la malfeliĉo estis ĉefe la trograndigita konstruo, kiu de kelkaj jaroj okazis. Tiu ĉi konstruo povis daŭrigi, ĉar la konstruestroj povis ricevi tiel facile grandajn kreditojn en la tiel nomataj « malgrandaj bankoj », kiel oni nomas ilin, ĉar ili iam estis malgrandaj ; sed ili tre pligrandigis siajn kapitalojn — kelkaj bankoj tiamaniere dum unu kaj duona jaro sepobligis siajn kapitalojn — por havigi monon por la konstruestroj. La « konstruestraj pruntoj » estis nome tre rekompenctaj aferoj, sed la bankoj ŝajne forgesis ke la profito nur ekzistis sur la papero. — La arkitekturstroj daŭrige spekulaciis, kaj nune estas en Kopenhago domoj aŭ konstrufundoj por loĝantaro duobla je la nuna, per tio vastaj sumoj estas fiksitaj. Iom post iom plimultiĝis la ŝuldo al la eksterlando kun la pli granda parto de unu mililiono da frankoj, parte okaze de dirita konstrueco, parte okaze de la malfavoraj komercaj bilancoj de la lastaj jaroj, kiuj elmontris jaran enport-bilancojn da ĉirkaŭ 250,000,000 da frankoj. Tio ĉi ja ne estas tiel terura, sed ĝi tamen malrekte katizis, kiel poste estos montrata, la komencan de la fatala « banka krizo ».

Kaŭze propono, lastan someron, de nova imposta leĝo, kiu tre malfaciligis la grandan enporton de francaj vinoj, la francaj financistoj, laŭ ordono de sia eksterlanda ministroj reprenis grandan parton de la grandegaj sumoj, kiujn Danujo prunte prenis en Francujo ; ekzemple, danaj komercistoj havis blankakreditojn en la parizaj bankoj sume ĉirkaŭ 150 milionoj da frankoj. Kontantoj estis antaŭe tre ŝparemaj en Danujo, — triono de la orŝetoj de la nacia banko jam estis foririnta al Anglujo dum la orŝento al U. S. A. — kaj tiom da akcioj de la Kopenhaga *Grandegaj bankoj* sume ĉirkaŭ sepmilion frankoj estis redonataj al la dirita banko, ĝi ne povis pagi tion ĉi en la cirkonstancoj grandan sumon. Ĝi tiel devis bankroti. La ŝparantoj en la aliaj bankoj faris « run ». Kvankam la ŝtato kun la kvin plej grandaj bankoj — ja malfrue certe — garantiis tridekmilion frankojn al la ŝparantoj de la bankrota G-bank kaj la minacata Detailhandlerbank, la du diritaj bankoj devis veni al juĝo. Dum

bonaj tempoj ĉio estas bona, dum malbonaj ĉio malbone, kaj laŭ tiu ĉi frazo la likvidanta komitato ankaŭ devis fari la bilanco, kun la rezultato ke ekzemple la D-bank perdis sian akcikapitalon, siajn rezervojn, kaj ĉiokaze tio eble kvin-sek milionojn. Du tagojn antaŭ la bankroto la akcioj estis citataj super cent ! La malĝojeco estas unue, ke ĉefe la nerikuloj procentdonis la ŝparojn en tiuj ĉi bankakcioj, kaj due ke tre multaj konstruestroj kaj poste iliaj liverantoj necese estos ne pagataj, speciale post la juna templino. Krom tio la nekoniado de la publiko ankaŭ al la bonegaj bankoj ankaŭ estas afero konsiderema, sed ĝi reiros kun la plibonigeo de la tempoj, kiu certe kiel la printempo post la vintro venos. Nur venos ĝi eble tre malfrue tie ĉi. Samaniere kiel la printempo de niaj nordaj landoj.

Ad. B. H.

U-ONO

Seattle, Aprilo 1908.

Jam la politika poto usona komencas boli. Tiu ĉi jaron elektigos prezidanto, multaj guberniestroj, kongresanoj kaj granda aro da aliaj oficistoj. Ĉiuj partioj havos kunvenojn ĉe kiuj oni nomos kandidatojn, kaj dum la periodo antaŭ la elektado en novembro bruados sendese granda batalado inter la partioj — pli ŝajna ol reala. La ĉiutagaĵo ĵurnalaj enhavas preskaŭ nenion krom paroladoj de la kandidatoj, iliaj movoj, sannaĵoj, hildoj, mensogoj pri kontraŭuloj, malbenoj al ĉio neportanta la markon de siaj propraj partioj, k. t. p., k. t. p. Ĉiu partio baldaŭ havos kunvenojn, la *Republicans* kaj *Socialists* ĉe Chicago kaj *Democrats* ĉe Denver. La prezidantelektoj en Usono ĉiam altiras multe da atento, kaj la proksima havas apartan signifon, ĉar kredible ĝi vidos la enkondukon de tute novaj demandoj en la politikan diskuton. La malnovaj demandoj, kiuj de longe servadis, jam perdis sian povon vekigi intereson kaj entuziasmon, kaj multaj kiuj kutime balotis por unu el la grandaj partioj, sin okupas pri studo de la nuntempaj aferoj kaj diras kiel la fama sinjoro de Missouri-ŝtato, — « vi devos montri al mi ! » La partio *republican* naskiĝis nur kelkajn jarojn antaŭ la interna milito de 1861-5, kaj ĝia celo estis limigi la sklavteritorion de Usono. La milito, kondukita de tiu partio kontraŭ la ribelaj sudŝtatoj, liberigis milionojn da nigraj sklavoj kaj teorie la laboro de tiu partio finiĝis per la konkludo de la milito. Tamen ĝi sukcesis konservi kontrolon de la nacio ĝisnune, esceptante okjaran *Democratic* regadon. Kompreneble la *Republicans* devis elpensi novajn batalcelojn kaj de tempo al tempo proponis « protection », (alta limimposto), « gold standard », (ora monbazo) « expansion », (teritoria pligrandigo) kaj en la lasta tempo laŭte krias kontraŭ la trustoj. Estas tamen fakte, ke la milito naskis multajn grandajn korporaciojn kiuj tuj kaptis la kontrolantan partion kaj de tiam ĝi konstante reprezentis nur ĝiajn mastrojn. Tion profetis la plej saĝa politikisto, kiu Usono iam produktis : Abraham Lincoln, nia glora prezidinto, kies vortojn nuntempe citas nur la partio socialista. La *Democrats* ĉiam protestas reprezenti la ordinaran popolon, defendas diversajn teoriojn laŭ necese, sed en la nuna tempo se ili iel diferencas de la *Republicans* neniu konsas kiel. Ambaŭ laŭte proklamas sian fidiindecon, honestecon, zorgemon por la intereso de la kapitalo kaj laboro, malbenas la trustojn kaj laŭdas siajn kandidatojn. La socialistoj proponas al la laborista klaso la programon bone konatan ĉie en la mondo, kaj ŝajnas nun kvazaŭ tiu partio, pro la paniko,

* Vidu « ESPERANTO » N° 28.



ESPERANTO



DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO
Unu Jaro Sm. 1.20 | Helpabono. Sm. 4.—
Spesado (fr.) = 100 Spesdekoj (Ed.) = 2.50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj =
1/4 dolaro = 1 rublo = 2.40 kronoj aŭtr. = 1.50 kronoj ŝved. (proksimume).
Oni abonas ĉe la Administrejo
S, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO:
HECTOR HODLER
S, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

REKLAMO
1 pago Sm. 100 — | 1/2 kolono Sm. 7.—
1 kolono 25 — | 1/4 kolono 4 —
1/2 kolono 13 — | 1/8 kolono 2.50
15 % por 12 anoncoj; 50 % por 24 anoncoj
Generalaj Agentoj: G. WARNIER, 46, Rue Sainte-Anne, Paris-8
G. A. G. BROWN, 53, Wych Street, London W. O.

Internacia Organizaĵo Esperantista

(III)

Per la du antaŭaj artikoloj ni mallonge klarigis la ĝisnunan historion de la ideo pri Internacia Organizaĵo Esperantista kaj montris la necescon de tiu nova organo por la konkordo de nia afero en la praktikan vivon. Ni nun havas la plezuron informi ninjn legantojn, ke la nomita Internacia Organizaĵo, post diversaj klopodoj, oficiale fondiĝis sub la nomo *Universala Esperanto-Asocio* (U. E. A.). Konsekvence, ni de nun parolos ne pri projekto efektiva aŭ efektiva, sed pri ekzistanta realaĵo, kies agado la publiko baldaŭ povos ĝui laŭ faktoj. Niaj legantoj trovas en ĉi tiu ĵurnalo la provizoran regularon de nia asocio kun ĉiuj detaloj pri tiu entreprenon. Ni ĉi tiu limigas nin nur per simpla skizo de la alprenita organizo.

Kiel ni jam diris, la Universala Esperanto-Asocio celas la plifaciligon de ĉiuj specaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreon de fortika ligilo de solidareco inter samideanoj. La unuan celon ĝi atingos iom-post-iom per la starigo de la diversspecaj internaciaj servoj, kiujn ebligas tiuj de nun la disvastigo de nia lingvo. La dua parto de la programo montras, ke nia Asocio estas gvidata ne nur de pure materialaj interesoj kaj komercaj celoj; grupigante ĉiujn homojn en unu tute neŭtrala organizaĵo, plimultigante la servojn, kiujn al si reciproke povas fari tiuj homoj, faciligante iliajn kreskantajn rilatojn internaciajn, donante al ili la eblecon sin ne nur reciproke komprenadi, sed ankaŭ *utiladi*, ĝi vole-nevole plifortikigos kaj plirealigos ilian solidarecon kaj kreas inter ili ligilon tiam pli nerompeblan, kaj ĝi havas materialan fundamenton. Unuvorte, la Universala Esperanto-Asocio, konforme al la celo, kiun ĝi aljuĝis al si, sekvas la tradicion de la ĝisnuna Esperantismo kaj penas fakte kaj enkorpiĝi tiun internan ideon, kiu gvidis la kreinton de Esperanto, kaj malgraŭ ĉiuj ventegoj vivigis la Esperantistaron, forpelis ĉiujn danĝerojn de disunigo kaj solidarigis ĉiujn Esperantistojn kontraŭ ĉiuj atencoj.

La Universala Esperanto-Asocio por la difinita celo uzos la lingvo Esperanto tiam, kia ĝi rezultas el sia verkaro; ĝi konsideras la lingvon kiel jam ekzistantan interkomunikilon, apartenantan al ĉiuj homoj, kiuj ĝin uzas, kaj sekve ne perforte tuseblas de la ajn aŭtoritato; ĉiujn teoriarajn lingvajn diskutojn ĝi konsideras kiel ekster sia celo. Fine, la neŭtraleco de la Asocio rilate al politiko, religio kaj nacieco estas principo, pri kies neceseco ni ne bezonas insinui.

Ni nun vidu kelkajn detalojn de la funkciado de la nova organizaĵo. Komence, estas ano de ĝi ĉiu ano de la grupoj, kiuj, aprobinte ĝian celon, jam elektis al elekto delegitojn, kaj plej ĉiuj personoj, kiuj pagos la malkaran kotizaĵon difinitan por la nuna jaro (24 ŝd). Tiamaniere ĉiuj anoj de la aligintaj organizaĵoj povos uzi la servojn starigatajn de la Asocio kaj ĝi ĉiujn tamen ĝi utiligos. La anoj, kiuj pagos la suprediritan kotizaĵon, ricevos karton, kiu donos al ili la rajton plendi, se ili ne ricevas la difinitajn servojn, kiujn ili rajtas. De 1909, laŭ nova difinita regularo, nur tiuj personoj, kiuj pagos sian kotizaĵon estos anoj de la Asocio kaj povos gaudi ĝiajn servojn.

La interna organizo de la Asocio estas kiel eble plej simpla. En ĉiu loko, kie tio estas ebla, estas delegito, elektita nun de la grupo aligintaj, poste nur de la anoj de la U. E. A. La delegito reprezentas la

komitaton, zorgas pri la interna administrado de la U. E. A., klopodas por starigi en sia loko la servojn internacie organizatajn de la Asocio. Li mem elektos sian anstataŭanton, siajn helpantojn, kiuj laboros por la funkciado de la diversaj fakoj, ĉiu laŭ sia specialeco, kaj subdelegitojn, kiuj en ĉiuj grandaj lokoj de sia regiono, reprezentos la delegitojn kaj tiu helpas por la plenumo de lia tasko.

La kondukantaro konsistas el komitato elektita de la delegitoj; ĉiu komitato sin okupas pri speciala fako kaj, sub sia respondebleco elektas mem la kunlaborantojn, kiujn li juĝas utilajn. Nuntempe, ekzistas nur tri fakoj: la fako 1^a, *Administrado*, kiu prizorgos ĉion, kio koncernas la internan vivon de la Asocio, delegitoj, financoj, oficiala organo, korespondanta laboro, k. t. p. La fako 2^a dediĉita al *Konsilaj kaj Oficijaj* sin okupas pri la starigo kaj regula funkciado de tiuj institucioj kun ĉiuj dependantaj servoj, kiel tradukado, dungado, virinoj, studentoj, komercio, k. t. p. La fako 3^a difinita por *Turismo* celas la organizon de esperantistaj vojaĝoj kaj ekskursoj, esperantistaj hoteloj kaj kolonioj, k. t. p. Kompreneble, laŭ la postuloj de la praktiko aliaj fakoj estos kreataj aŭ per kreo de novaj; sed en la komenco estas neceso limigi la nombron de la traktataj demandoj.

La laboro de la Asocio estos farata koresponde per la oficiala organo aŭ per specialaj ĉirkaŭoj al la delegitoj, laŭ la okazoj. La delegitoj kunvenos dum la kongreso por pridiskuti la situacion de la Asocio kaj proponi la jaran kotizaĵon fiksiman laŭ la bezonoj, sed la difinitaj decidaj ĉiam estos solvataj koresponde, tiamaniere ke ĉiuj delegitoj estu egalrajtaj kaj povu decidi konsente kun la anoj de sia regiono. Fine, ni aldonu, ke ĉiu delegito, laŭ tre simpla maniero, rajtas submeti al la Asocio siajn proprajn proponojn por ĝenerala voĉdonado.

Kiel oni povas ĝui, tiu organizaĵo estas samtempe simpla kaj fleksebla; ĝi povas libere plivastigi laŭ la bezonoj kaj ĉirkonstancoj per vojo normala, sen ŝanceligo de la primitiva fundamento.

Kun tiu programo ni turnas nin al la jam vasta popolo esperantista, al ĉiuj samideanoj, kiuj deziras ĉifi el la vojo de vana diskutado kaj pura predikado por eniri en la vojon de la efektiva uzado kaj valorigo de Esperanto kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj; al ĉiuj, kiuj volas labori, ni turnas nin kun la espero, ke nia alvoko estos aŭdita. Ne mankas la laborantoj en la esperanta rondo, multenombraj estas la bonvoluloj, sed ili ĝis nun estis sufiĉe utiligataj. Pro manko de forta ligilo kaj taŭga internacia organizaĵo, kiun postulas la nunaj bezonoj de nia movado, multaj individuaj klopodoj estis perditaj kaj multaj laŭdindaj entreprenoj mortis, ĉar ili ne estis sufiĉe konitaj kaj helpitaj. Dank'al la nova organizaĵo, ĉiu povas labori pri speciala fako, kun la certeco, ke lia laboro estos ne vana penado, sed valora kontribuilo al la granda klopodo de miloj da aliaj homoj. La plej humilada batalanto, la plej nekonata soldato povos fosi sian propran sulkon, sed el la sulko metode fosta de ĉiuj unuigitaj laboristoj baldaŭ kreskos garbo de neantaŭvidita graveco, kaj la Esperantistaro, kiu nuntempe pro sia nesufiĉa unueco estas ankoraŭ ne-granda rondo sur la vasta tero, pli kaj pli potencegos kaj per la faktoj kaj la vivo mem, sen alia levilo ol la konsenta kaj orda laboro de siaj anoj, sin trudos al la tuta mondo, kaj farigos atendinda faktoro en la plivastigo de la vivo internacia.

En la proksimaj artikoloj, niuj diversfakaj kunlaborantoj klarigos pli detale la servojn, kiujn organizos la fakoj, por kiuj ili speciale laboros.

(Daŭrigota).

H. HODLER.

TRA LA MONDO

GERMANUJO

Frankfurt-a/M., Aprilo 1908.

Mi opinias, ke estos intereso por la legantoj aŭdi ion pri la intencoj de la ĉefa ŝtata banko en Germanujo, nome de la «Reichsbank» (Imperia banko). La «Reichsbank» havas kapitalon da 90 000 000 Sm. kaj tiu ĉi kapitalo estas dividita en 40 000 partoj po 1 500 Sm. kaj 6 000 partoj po 500 Sm. La simileco, kiun pri tiu havas la «Reichsbank», kun akciaj societoj, estas nur ajna, ĉar ĝi posedas propran banklegon, laŭ kiu ĝi estas kiel ŝtatabanko. La direktado de la Reichsbank estas en la manoj de la imperio, kaj la imperia kanceliero estas la estro de tiu ĉi direktado. Li direktas la tutan bankon kaj donas siajn ordonojn al la estraro de la banko kaj al la oficistoj de la instituto. La aganta estraro de la banko konsistas el unu prezidanto, unu vicprezidanto, kaj 6 aŭ 7 membroj, estas elektataj de la imperiestro mem laŭ proponoj de la ministraro aŭ de la delegacioj de la diversaj germanaj ŝtatoj. La kontrolado de la banko estas ankoraŭ afero de la imperio, kiu por tiu celo elektas 4 personojn. La oficistoj de la «Reichsbank» estas imperiestraj oficistoj kaj havas la rajtojn kaj la deonojn de la imperiaj oficistoj. La posedantoj de la akcioj aŭ partoj havas nur malmulte da rajtoj. Ili nur povas elekti en la ĉiujara ĉefkunveno 15 membrojn, kiuj reprezentas ilin kontraŭ la estraro kaj kontraŭ la direktado de la banko. La profito de la banko estas dividita per jena maniero: la posedantoj de la partoj ricevas unue 3 1/2 %. El la restado de la profito la nomitaj posedantoj ricevas 1/4 kaj la ŝtato 3/4. La alto de la dividendo estas fiksa de la imperia kanceliero laŭ propono de la estraro. La «Reichsbank» havas ĉirkaŭ 400 filiojn en Germanujo. Laŭ § 12 de la banklego, la banko havas precipe la celon reguligi la tutan monkuradon en la imperio, faciligi la elpagojn kaj zorgi la uzadon de la ŝtanta kapitalo.

H. FRICK.

NOV-ZELANDO

Mount Roskill, Marto 1908.

Tiu ĉi lando, ĉe la malproksima sudo de la terglobo havas naŭcent mil loĝantojn, el kiuj iom pli ol kvardek mil estas Maŭrioj — la originalaj loĝantoj de la lando. La nova politika konstitucio estas de la plej demokrata speco. De la jaro 1893 ĉiu regnanta dudekunu jara, viro aŭ virino, havas rajton voĉdoni por elekti parlamentajn reprezentantojn. La parlamento konsistas el 80 reprezentantoj el kiuj 4 estas Maŭrioj. La 76 eŭropanoj estas elektataj de la eŭropaj gelektaĵoj, kaj la 4 Maŭrioj de la maŭriaj gelektaĵoj. Por ke oni elektu tiujn, la lando estas dividita en 76 apartaj elektaj distriktoj por la eŭropanoj, kaj ankaŭ en 4 por la Maŭrioj. Esceptante la Maŭriojn, ĉiuj estas elektitaj en unu tago, ĉiutrigare: tial la parlamento estas trijara. La reprezentanto estas elektata de simpla plimulto: kaj ne estas dua baloto: tial, kelkfoje okazas ke la elektito reprezentas nur malplimulton. La anoj de la

ministraro (registaro) estas el tiu sama reprezentantaro, kaj ĉiutrigare, ili devas esti denove elektataj de la gelektaĵoj de ĉiuj propraj distriktoj, same kiel aliaj kandidatoj — Kompreneble, la ministraro tenas oficon ĝis la elekto de kontraŭstaranta plimulto.

De la elekto kiu okazis en Decembro 1890, ĝis nun, la «liberala» partio superregas, dum la «konservativa» partio daŭre malpliiĝas, ĝis ĝiaj reprezentantoj hodiaŭ sumas nur ĉirkaŭ 75 anoj. La parlamento elektita en 1890 estis la unua elektita de la tuta viraro de la lando, laŭ la principo de «unu viro, unu voĉdono». Antaŭe, la bienuolo povis voĉdoni en ĉiu elekta distrikto, kie li posedas bienon de la valoro da 240 Sm.; kaj plej, li povis aldone voĉdoni pli ol unu voĉdonon en ĉiu, laŭ la valoro de sia bieno. Tial kelkaj el la bienuloj voĉdonis en tiel multaj elektaj distriktoj, kiuj ili povis viziti dum la elekto-tago. Ĉe la 1890 elekto, tamen, ne estis duoblaj kaj multoblaj voĉdonoj por iu elektanto; tial venis la venko de la *homo super la propraĵo*, kiu ne estis renversita ĝis nun — La unua parlamento elektita de ambaŭ *voj* kaj *virinoj*, estis tiu elektita en novembro 1893. La unua ĉefministro de tiu ĉi deksesjara superregado liberala estis S-ro John Ballance, kiu, tre bedaŭrinde, mortis post ĉirkaŭ tri jaroj. Post, venis S-ro Richard Seddon, forigita ĉefministro, kiu direktis nian ŝtatsipeton dum 13 jaroj, kiam li ankaŭ mortis; kaj nune S-ro Joseph Ward estas la ĉefministro. En la daŭro de tiuj ĉi dekses jaroj, la liberala partio faris multon da plibonigoj al la bono de la popolo: kvankam kelke da ĝiaj leĝoj ne atingis tion, kion oni atendis. De 1888 ĝis 1891 Nov-Zelando estis preskaŭ runigita per profunda paniko, alportita al ni de la terspekulaciistoj, kiuj, ĉe tiu tempo, tial plialtigis la prezon de tero, ke la teruzantoj nemal pagis pli da la terpezono aŭ la jaran terluprezon postulatatan de la terspekulaciistoj kaj bieneguloj. Tial, ĉar oni devas uzi feron por vivi, tre multaj homoj lasis N. Z. kaj forvojaĝis Aŭstralion. La tuta lando estis mizera, kaj kiu ajn povis forkuri, je tiu tempo, certe forkuris. Sed kiam S-ro Ballance fariĝis ĉefministro, li tuj trudis terimposton, kiu baldaŭ malfermis la teron al la uzantoj: kaj la postvenintaj ĉefministroj estas sekvintaj tiun saman vojon ĝis nun. De tiu tempo N. Z. prosperis. Sed, hodiaŭ la terspekulaciistoj rice multajn plialtigis la terpezonojn; tamen, nuna terleĝo de la pasinta jaro devigos ilin pagi pli justan terimposton; ĉar ili evitadis en la daŭro de kelkaj jaroj la pagon de sia justa terimposton per hontaj ruĝoj, kiujn la leĝistoj ĉiam eltrovas por ili.

Ekster la reprezentantoj estas ĉambro de ĉirkaŭ 55 «Legatantaj Konsilantoj», serce direktaj «La Sinjoroj», eble ĉi la ĝusta nomo estas tro longa. Tiuj ĉi kelkfoje aliĝas aŭ malpermesas proponitajn leĝojn. Ili estas elektitaj de la ministraro, kaj tenas oficon dum sep jaroj. Antaŭe, la «Sinjoroj» estis nomitaj ĝis morto. Kaj 9 de tiuj anoj restas ankoraŭ — unu el ili estas ano de la dua ĉambro dum 47 jaroj, alia dum 43 kaj alia dum 41 jaroj; kaj tri aliaj el la «ĝismortaj» anoj tie sidas, kiuj estas tri el 13 anoj, kiuj estis nomitaj de la «Konservativa» ĉefministro post sia malvenko ĉe la baloto de Decembro 1890, por ke la dua ĉambro povu malhelpi liberalajn leĝojn: kaj la *reganto* (governoro) ne rifuzas, ĉe ne protestas, sed volonte tion faris. Tiuj naŭ estas la lastaj de la «ĝismortaj» anoj: ĉar baldaŭ poste, la parlamento aliĝis la leĝon por ke la novaj elektitaj tunc oficon nur dum 7 jaroj. Ne tro multe oni respektas tiun ĉambrojn, sed ofte parolas pri ĝi, kiel «*refuĝejo de maljunuloj*». Kutime